

Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, FEBRUARO 2009, JARKOLEKTO 27

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

Kompreneble la piloto estis lerninta la psikologion kiel trakti pasaĝerojn en krizaj situacioj. Ne necesas panikigi ilin. Do, kiam unu el la motoroj subite strikis, kaj la alia ekfumis, li surmetis sian paraŝuton kaj survoje al la pordo li diris: "Nun vi restu perfekte trankvilaj dum mi eliras por trovi helpon!"

Edukado

Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta Marcelo Leereveld. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$ 23,00!

"Mi deziras aĉeti pecon de kolbaso."

"Ĉu hejmefaritan aŭ ĉasistan?"

"Kio estas la diferenco?"

"Ni mem faras la ĉasistan kolbason, sed la hejmefaritan ni ricevas de iu fabriko!"

Mummy, why can't we all speak the same language"

La bona libro "Mummy, why can't we all speak the same language?" aĉetebblas de Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077, aŭ perrete Nicole@cryogenic.net kontraŭ \$ 6,95 plus afranko \$ 1,95. Ĝi estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn.

Diras tre ebriega viro al preterpasanto: "Pardonu min, sed ĉu vi povas diri al mi, kie mi estas?"

”Vi estas ĉe la angulo de Port Road kaj Woodville Road.”

”Ne tiom da detaloj, mi petas. Nur diru al mi en kiu urbo mi troviĝas?”

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 4an de februaro ni renkontiĝos en Clarence Park je la 18a horo.

De la 11a ĝis la 25a de januaro 2009 la Somerkursaro de Aŭstralia Esperanto-Asocio okazos en ”International House”, 96 City Road, Chippendale, NSK 2008, en la belega urbego Sidnejo.

En februaro ni vizitos la rozĝardenon en Garrick Hill.

En marto ni prenos parton en la kajtofestivalo kaj boatekskurso en Adelajdhaveno.

En aprilo ni teatrumos ĉe Pat.

En majo ni vizitos la mangloarbaron en Sankta Kilda.

La 94a Universala Esperanto-Kongreso okazos de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

En 2010 la Universala Esperanto-Kongreso okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.

Kaj jen sekvas amuzaĵo el ”La Dépêche”

Okazis meze de januaro, unu el la plej malvarmaj monatoj en Francujo, la infanĝardeninstruistino bezonis helpi 5-jaruleton surmeti siajn botetojn, ĉar li deziregis eliri por ludadi dum la instruopaŭzo.

La infanĝardeninstruistino estis bona fraŭlino, kiu kun ĝojo helpis ĉiujn infanojn, do ŝi puŝadis kaj ĉiudirekten tiradis la botetojn, ĝis ili fine troviĝis sur la piedetoj de la 5-jarulo, kiu diris : ”Fraŭlino, la dekstra boto estas sur la maldekstra piedo, kaj la maldekstra boto estas sur la dekstra piedo”.

La infanĝardeninstruistino ekscitiĝinte ektiris la botojn – tio daŭris iom longe – ĝis fine la botoj troviĝis sur la ĝustaj piedoj. Trankviliĝinte la instruistino ridetas al la knabeto, kiu naive kaj mallaŭte diras: ”Fraŭlino, ili ne apartenas al mi”.

Kvankam la fraŭlino sentas fortan emon vangobati la knabeton, ŝi sukcesas ne fari tion, kaj mordinte la lipojn, ŝi demandas: ”Kial vi ne diris tion antaŭe?”

La knabo, komprenante ke li ĉagrenetis la fraŭlinon, nenion respondas.

Tiam diras la fraŭlino: "Nu, necesas ke ni deprenu ilin, ĉu ne?" Kaj ŝi rekomencas la malfacilajn klopodojn.

Kiam la dua boto estas preskaŭ detirita de sur la piedeto de la knabo, tiu kuraĝas diri: "Ili ne estas miaj, ili estas tiuj de mia frato, sed Panjo diris, ke mi rajtas ilin surhavi".

La fraŭlino preskaŭ plorante, sed ŝajnigante trankvilecon, resurmetas la botojn.

Ŝi tre fieras pro sia sukceso helpi etan knabeton. Ŝi starigas lin, surmetas sur lin lian surtuton, la koltukon kaj demandas lin: "Kie estas viaj gantoj?"

La knabo respondas tre mallaŭte: "Ilin mi metis en la botojn..."

La instruistino Monique

Ĵaŭdon la 8an de januaro, tuj antaŭ la komenciĝo de la Somerkursaro, vizitis la adelajdajn gesamideanojn Monique. Nu, certe la plej multaj el vi jam konas, aŭ almenaŭ aŭdis pri tiu tre ĉarma kaj lerta esperantistino el Francujo.

Grupo da adelajdaj esperantistoj renkontiĝis kun ŝi en "La Palais", restoracio tre proksima al Semaphore, la iama hejmo de Katja kaj nuntempa hejmo de Libby Mortimer, kiel ankaŭ de Felby. Tie, tuj apud la atendante Trevor kaj tie, kiel jam dirite, tuj apud iam verkis bonegan kanton Libby, ĉar ege plaĉas al ŝi la maro. Menciindas ke ŝi verkis ne nur la tekston, sed ankaŭ la melodion, ĉar ŝi estas ege muzikema kaj muzikkapabla.



Trevor, kaj
kaj Arturo
Audrey kaj Bob
maro ni sidis
Monique. Ni sidis
la maro, pri kiu

Nur iomete malfruiĝintaj venis Trevor kaj Monique. Ili fakte alvenis jam je la konsentita horo, sed ili, ĉar ili estas ja gemoŝtoj, eniris laŭ la ĉefa pordo situanta fronte al la vojo, dum ni, ankoraŭ ne gemoŝtoj, eniris laŭ la malĉefa pordo situanta fronte al la maro.

Do, ni mendis kafon, teon, akvon, kukojn ktp. Dum nia agrabla interparolado ni gluton post gluto finis la kukojn kaj guton post guto finis la kafon, teon kaj akvon. Do, ĉiuj konsentas, ke ni ĉiuj ĝuis la kunestadon kun tia bonega esperantisto el Francujo.

Ŝi loĝas 25 kilometrojn for de la sudorienta franca urbo "Gap", kiu situas 750 metrojn super la marnivelo. La vilaĝo, en kiu loĝas Monique, situas 1.300 metrojn super la marnivelo. Tie dum la vintro, kiu regas nun, estas eĉ treege malvarmege, kelkfoje 27° sub la nulo. Tio estas eĉ tre malvarmega. Mi mem ĝis nun spertis nur 21° sub la nulo, dum lia moŝto Trevor iam spertis 35° sub la nulo.

Ni finis la kunestadon, ĉar ĉio bona devas finiĝi, ĉu ne? Same kiel ĉio malbona! Baldaŭ poste ŝi estis en Sidnejo, kaj mi restis en Adelajdo, ĉar mi ne havis sufiĉe da mono por partopreni la Somerkursaron. Sed eble venontan jaron mi iros Sidnejen!

Promenis patro kaj fileto. Subite ili troviĝis meze en politika kunveno surstrata. Ili haltis iomete, tiam ili daŭrigis sian promenadon.

"Paĉjo, kio estas kamarado?"

"Ĉu kamarado? Vi kaj mi estas kamaradoj."

"Ĉu, kaj kio do estas la popolo?"

"Jes, la popolo... ĝi estas ni, Panjo kaj ĉiuj homoj."

"Kaj la estonteco, kio estas ĝi?"

"La estonteco, ĝi estas via malgranda fratino, kiu kuŝas en la lulilo."

Dum la nokto la knabo kurante eniras la dormoĉambron de la gepatroj kriegante: "Kamarado, veku la popolon! La estonteco fetoraĉas kiel malmanĝaĵo!"

La Papo bondeziris en Esperanto

Ĉijare Benedikto la 16a daŭrigis la tradicion kaj inter alilingvaj bondeziroj eldiris siajn kristnaskajn kaj novjarajn salutvortojn ankaŭ en Esperanto. Kiel kutime, en la popolamaso en Vatikano ĉeestis esperantistoj, kiuj

levis panelojn kun la literoj de la vorto “Esperanto”, kiam aŭdiĝis la esperantlingva saluto. La paneloj bone videblis en la rekta televida elsendo, sed la itala televido spite tion pri saluto en la teksto ”saluto en la televidekrano parolis latine.



En 2005 la nova Papo Benedikto la 16a interrompis la multjaran tradicion de sia antaŭulo Johano la 2a, kaj post sia Kristnaska parolado ”Al la urbo kaj al la mondo” (”Urbi et Orbi”) ne eldiris Kristnaskajn salutojn en Esperanto. Tiam li decidis duonigi la kvanton de lingvoj, en kiuj li diris mallongajn Kristnaskajn bondezirojn. Inter la 32 lingvoj, kiujn li tiam uzis, krom Esperanto mankis interalie la litova, la ĉeĥa kaj la slovaka.

Paske 2006 revenis la Esperantlingvaj bondeziroj, kaj de tiam ili refoje estas regula parto de la Paskaj kaj Kristnaskaj salutoj de la Papo. En Esperanto li Kristnaske ĉiujare diras ”Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron”, precize kiel kutimis diri lia antaŭulo Johano la 2a.

Same kiel dum la antaŭaj benoj Urbi et Orbi, Kristnaske kaj Paske, ankaŭ ĉifoje grupo de esperantistoj ĉeestis en placo Sankta Petro por alten levi la panelojn, kiuj konsistigis la vorton ”Esperanto”. La paneloj klare videblis dum la televida elsendo, kaj Giovanni Daminelli, prezidanto de la itala sekcio de Internacia Katolika Unuiĝo de Esperantistoj estis intervjuita de ĵurnalistoj.

Pri la Kristnaska saluto de la Papo senprokraste raportis la retejo de IKUE, kie legeblas kompleta esperantlingva traduko de la Papa parolado. Laŭ la retejo, la paneloj de la esperantistoj vekis iom da interesiĝo en la placo: ”Kiel kutime, multaj alproksimiĝis por demandi ”kio estas Esperanto?” Tre interese: tra la placo, homoj, kiuj vidis nur de malproksime la panelojn, ripetis: ”Esperanto, Esperanto”. Do trairante la lokon, oni ŝajnis esti en Esperanto-aranĝo.

Iu opinias, ke tia aktivo estas imitinda. Eblas ankaŭ peti de aliaj famuloj ĉu ili pretas saluti la novan jaron en Esperanto.

La lokaj Esperanto-grupoj devas serĉi instancojn por agi similcele – eĉ se laŭ tute alispecaj, respektive trafikaj metodoj – en siaj koncernaj medioj. Plej verŝajne, la specifaj trajtoj estas sufiĉe malsimilaj inter la unuopaj realaĵoj, sed ne la respondeco diskonigi la ekziston kaj potencialon de Esperanto.

El Libera Folio

”Kio okazis al tiu knabino, kiun vi antaŭ longe trasegis, kiam vi perlaboris vian monon kiel magiisto?”

”Ho, ŝi, ŝi nun loĝas en Melburno kaj Kanbero!”

La teorio de Zamenhof kontraŭdiras sin mem

La Zamenhofa teorio povus esti resumata ĉi tiel: La mondo bezonas komunan lingvon por komunikado, lingvon, kiu ne detruos la ekzistantajn lingvojn. Sekve ĝi devus esti neŭtrala dua lingvo por ĉiuj. Krom al komunikado tia lingvo kontribuas ankaŭ al pli paca mondo.

Mi entuziasmiĝis pri ĉi tiu teorio kaj iĝis fanatika esperantisto.

Sed iom post iom mi sentis kontraŭdiron en tiu ĉi teorio. Agante por la ideo de esperantigo de la mondo mi daŭre renkontis malamikan lingvon sur tiu ĉi vojo, lingvon, kiun mi laŭteorie devus konsideri amika: la anglan.

Ni ja estas kontraŭ neniuj lingvoj, per Esperanto ni helpas al ĉiuj lingvoj inkluzive de la angla, kaj ni amas ĉiujn same. Mi tamen ne povis kontraŭstari al mia malŝato rilate la agresemon de la angla. Mi ĉiam pli sentis kontraŭdiron en la teorio. Mi ŝatas ĉiujn lingvojn krom la anglan, la lingvo, kiu agas por malebligi la celojn de Esperanto, la lingvo kiu aktive malebligas la ŝancojn de la esperantista teorio.

Ĉu eblas konstrui teorion, kiu ne estus kontraŭdira? Jes ! Kaj jen ĝi: La lingvo estas ne nur komunikilo, ĉar ĝiaj

du ĉefaj funkcioj samgravaj estas la komunika kaj grupidenteca. Por esti kompleta lingvo, ĉiu lingvo devas posedi sian grupon, kies identecon ĝi markas. Nur ĉar Zamenhof tion sentis intuicie, kaj kreis krom lingvon ankaŭ ideologion (la interna ideo), al kiu ligiĝis homoj, do kreis grupon, kiu akceptis tiun lingvon kiel sian identecsimbolon, Esperanto ekvivis kaj fariĝis plena lingvo diference al ĉiuj aliaj internacilingvaj neŭtralaj provoj, en kiuj la kreintoj kaj iniciatintoj volis krei nur komunikadilon.

Ĉar lingvo estas kompleta nur se ĝi plenumas ambaŭ funkciojn, rezultas ke tutmonda lingvo NE EBLAS. Ĝi ne povus plenumi la identecan funkcion kiel dua lingvo, kaj kiel eventuala unua lingvo ĝi ankaŭ ne povas efektiviĝi la identecan funkcion, ĉar ĝi havas sencon nur, se la koncerna grupo (tutmonda homaro) diferenciĝas de iu alia grupo. En tiu kazo alia ne ekzistas.

Sekve mi forĵetis la ideologion pri tutmonda internacia lingvo, sed akceptis la teorion pri pluraj internaciaj lingvoj, kiuj inter si konkurencas, kaj inter kiuj ĉiu havas ankaŭ iun grupon, kies identecon ĝi signas, al kiu ĝi apartenas.

Nun Esperanto apartenas al esperantistoj; ne gravas, ke mankas al ili teritorio – ili simple estas unu el pluraj senpatrujaj popoloj dissemataj ĉie, kiel siatempe la judoj, nun ciganoj, kurdoj ktp. Sed se Esperanto fariĝus eŭropunia lingvo, komence helpa, sed iom post iom la ĉefa (unua) eŭropa lingvo – kio logike sekvus el tio, ke oni ĝin uzus ĉie en administracio, informado, supera edukado ktp. – ĝi iĝus eŭropunia identeclingvo kaj unu el la plej fortaj konkurencantoj inter la internaciaj lingvoj de la mondo apud la angla kaj kelkaj iom pli regionaj kiel la hispana, ĉina, rusa, franca...



Tiu teorio ne estas kontraŭdira. Ĝi plene kaj konsekvence sekvas la faktojn, ke novaj lingvoj daŭre aperas dum aliaj mortas, ke sekve apero de Esperanto ne

estas escepto, ĝi konsekvence montras, ke lingvo estas nur tiu, kiu havas sian grupon kaj simbolas identecon, kaj ke multegaj lingvoj estas fakto, en kiu inter si distingiĝas kulturoj kiuj konkurencas sur la merkato. Foje iu estas pli forta kaj alia malpli forta ktp.

Ĝi estas ankaŭ nur plia simpla ekzemplo, ke nur lingvo neŭtrala povas krei superan identecon komunan por homoj el iu ajn nova grupo ekestinta el homoj apartenantaj al diversaj aliaj grupoj. Se ne (se la komunan identecon oni volas krei per neneŭtrala lingvo, kiel iam en Sovetunio) temas pri perforta premo por krei novan identecon, kiu ne havas ŝancon longe ekzisti.

Sekve, mi agas konscie por tio, ke iam Esperanto fariĝu eŭropunia lingvo, lingvo de eŭropunia identeco, kio signifas, ke ĝi detruus la klasikan Esperanto-movadon kun ties interidea teorio kaj idealismoj. Tiun ĉi duan konsekvencan mi kompreneble ne ŝatas, ĉar ankaŭ mi ĝuas ties varman komforton kaj solidarecon, sed mi scias, ke ne estas alia vojo por la efektiva celo de Zamenhof por transformi la lingvon al granda monda lingvo kun forta internacia rolo.

Ŝovante la kapon en la sablon, preferante la nelogikan teorion, Esperanto ne malaperos. Ĉiam ekzistos kelkdek mil idealistoj, kiuj volos kredi al la tutmondisma dualingva teorio kaj ĝui en malgranda popolo de esperantistoj.

Zlatko Tišljar, sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio

En juĝejo iu akuzatis pri kontraŭlega brandofarado. Demandis la juĝisto la atestanton: "Ĉu vi iam ricevis de li alkoholon?"

"Ne!"

"Do, ĉu vi iam ricevis tion de lia edzino?"

"Ne!"

"Ĉu vi iam ricevis ion de lia filino?"

Fariĝis tre silente en la juĝejo, tiam diris la atestanto: "Mi supozas, ke ni ankoraŭ parolas pri alkoholo, ĉu ne, s-ro juĝisto?"

"Kion diris la instruisto pri la eseo, kiun mi skribis por vi?"

"Li diris, ke ĝi estas sufiĉe bona por 10-jarulo!"

